

AVENO 14 - Aprilo 1996

Amikajn salutojn,

mi deziras al vi Ĉion Bonan por la resto de la jaro 1996.
Ĉar mi volas inviti vin al niaj sekvaj renkontiĝoj mi sendas nun nur malmultajn informojn (pri detaloj vidu pli sube):

>> Vieno (21-23a de junio): AVE-informstando kaj renkontiĝo, je EFGP-konferenco.

>> Prago: (inter 20-27a de julio): AVE renkontiĝo, 2 hora, okaze de 81a UK de UEA. Raporton vidu je la fino:

Intertempe AVE havas pli ol 140 membroj, inter tiuj 20 kun ret-adreso, ĉ. 20 estas membro de sialanda verda partio.

Mi/AVE nun havas adreson en la APC-reto (alternativa kaj progresema komunikado).

Malgraŭ mia forta deziro ne eblos viziti la SAT-kongreson '95 en St.Pe-terburgo.

Nukleaj Testoj:

Ni esperas, ke kun la fino de la francaj nukleaj provoj venos la tutgloba fino de tiaj nukleaj eksperimentoj. Jam Grandbritio, Francio kaj Usono rezignas pri nukleaj-provoj en la pacifiko.

Ĉernobil:

La 26a de aprilo ja estas dek-jariĝo de la nekontrolebla nuklea ĉen-reakcio en Ĉernobil; ankoraŭ nun - eĉ en nia regiono (je la rivero Reno - 2000 km for de Ĉernobil) fungoj enhavas plialtigitan radioaktive-con. Kaj pli danĝere estas, ke la rompita reaktoro denove povus elimini radioaktivan materion en la biosferon. Estos multaj memor-okazaĵoj:

Kiev: La Verda Orient-Okcidenta Dialogo okazos je 20-22a de Aprilo en Kiev, Ukrainio, proksime de Ĉernobil. La temaro rilatos pri riskoj de nukleaj centraloj kaj pri alternativoj.

-> Green East-West Dialogue (H. Spenkelink/A. de Boer),
FAX(Bruselo): +31 20 625 18 49

En Gomel (proksime de Ĉernobil) estas planata konferenco kun akcepto de kontribuoj en Esperanto: Aleksandr Koval, p.o.box 99, Belarus-246050 GOMEL; ret-adreso: user@biar.gomel.by

Inter Freiburg (D) kaj Kolmar (F), sur la Reno-ponto inter Germanio kaj Francio, proksime de la nuklea centralo de Fessenhejm, estos memor-manifestacio je la 28a de aprilo. En la elektronika reto troviĝas multaj aliaj fiksdatoj: ...

Baloto- kaj aliaj rezultoj de la Verduloj:

Ĝemeliĝo: propono de Nic Best, de la angla Verda Partio, estus bone ke unue la Verduloj uzu la ekzistantajn partnerecojn inter siaj urboj por batali kune, ekze kontraŭ troigo je aŭtoŝoseo-konstruado. Gravas ankaŭ, ke studentoj agos en tia ĝemeliĝo.

Eŭro-Mediterranea Konferenco por daŭrigeble evoluo en tiu ĉi regiono; partoprenis Verduloj kaj specialistoj el la EU-landoj kaj el aliaj mediterraneaj landoj.

Temoj estis medio, akvo kaj laborgrupo pri "Migrado kaj Kultura Interŝanĝo".

Eŭropa Civila Pac-Korpuso: (ideo de Alexander Langer +)

Partoprenis "Aŭstria Stud-Centro por Paco kaj Konflikto-Solvado" kaj Tampere Paco-Esplora Instituto. Kontakto por informi pri venontaj seminarioj al Ernst Guelcher, Verda Grupo en la Eŭropa Parlamento, REM 209, rue Belliard 97, B-1047 Bruselo; aŭ e-poŝte: flemunpeace@gn.apc.org .

Eko-Impostoj: Je AVE-renkontiĝoj (kaj en VERDire) mi ŝatus prezenti la diversajn modelojn por ekologi-rilatajn impostojn en diversaj landoj, kiuj rilatas al foruzo de resursoj (oleo, karbo, tergaso, metaloj), uzo de akvo-forto. Krome

interesas subteno de alternativaj rimedoj (sun-energio, bio-gaso, resursaj plantoj). Viaj kontribuoj estos bonvenaj. *

Albanio: Verda Partio partoprenos la balotojn.

* Aŭstrio: Verda Partio gajnis 4.8% (antaŭe 7.3%), tamen sufiĉas por 9 sidoj.

* Bulgario: sur komunala nivelo estis elektitaj 35 verduloj kaj 5 urbe-stroj.

* Ciprio: ekiĝis Verda Partio - elektoj estos en majo.

* Germanio: Landaj balotoj (Ligo 90 / La Verduloj): Nordrejn-Vestfalio (nord-okcidente): 10 % ruĝ-verda koalicio; Ŝlesvig-Holstejn (norde): 7.5% - iĝos ruĝ-verda koalicio; Rejnland-Pfalco (okcidente): 6.8%; kaj Baden-Virtembergo (sudokcidente): 11.6%.

* Georgio: ili kune elektiĝis sur listo de Civitana Unio, kiu gajnis la elektojn kaj subtenas la registaron de E. Ŝevardnadze (5 seĝoj kaj ministrino pri medio).

* Hispanio: Verduloj (Los Verdes Europeos) malgajnis de 0.7 al 0.24%; Izquierda Unida ricevis 10.5%. (Ĉu hispana membro de AVE povus klarigi la diferencon?).

* Norvegio: Claude Rouget, redaktoro de VERDire elektiĝis por la Verduloj en la urban registaron de Tromsø; despli grava, ĉar li estas franco. Krom li 7 aliaj gajnis sidon kaj unu sidon en regiona parlamento. Verduloj nun agas je ekonomia kampo kaj por Agenda 21 (de Rio '92). Ekiĝis nun pluraj lokaj grupoj.

* Pollando: pluraj homoj kaj asocioj laboras (pli aŭ malpli) kune - ekz-e ili eldonas Green Brigades (en la pola kaj angla) kie kolektiĝas artikoloj el la tutlanda movado.

* Rusio: Green Party volis partopreni la elektojn (1995) kun la Sendependaj Komercisto-kolektivoj, sed ne ricevis la necesajn subskribojn (200.000).

Ekologia partio "Kedr" (=cedro) gajnis 1% (1991 estis 0.7%); membroj de Kedr estas (i.a.) establita homoj, oficistoj kaj komercistoj.

* Svedio: Ili ricevis 17.2% en lastjaraj svedaj balotoj al la EP, tial nun estas 4 svedaj Eŭro-Parlamentanoj (vidu la adresaron de EFGP), kiun mi kunsendis.

* Taiwan: nova Verda Partio nun eklaboras por la nunaj balotoj; ili petis helpon de EFGP por ke Ĉinio respektu la memdecidrajton de la popolo de Taiwan.

* Usono: Ralph Nader, konata pro protekto de rajto de uzantoj, estas kandidato de la Verduloj por prezidento de Usono.

Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj_ (angle: EFGP) (2020: www.europeangreens.eu): La 1a kongreso (antaŭaj kongresoj ne nombras, ĉar ŝanĝis la formo) okazos 21-23a de junio en Vieno (Aŭstrio). Mi kunmetas mendilon en la angla (la prezoj rilatas al aŭstraj ŝilingoj). Bonvolu sendi vian mendon antaŭ la 1a de majo al "Die Gruenen, Peter Altendorfer, Linden-gasse 40 / 2, A-1070 Wien (vidu supre !)

Mi mendis eblecon por renkontiĝi en kadre de AVE kaj por havi inform-standon pri Esperanto kaj AVE. Do, mi ĝojus renkontiĝi kun pluraj de vi. La lingvo de la konferenco estos la angla. Interpretado estos (ple-jofte) en la anglan, germanan, francan kaj rusan lingvon.

La horario (mallonge):

Vendredo 21a de junio:

14.00 Merkato de Verdaj Eblecoj - do, informstandoj ktp. - AVE-informotablo.

16.00-18.00 Registrado; 18.30 Malfermo;

19.00 Verdaj vizioj por Eŭropo, gvidota de Yvonne Ruwaida, MP (S); Claudia Roth, MEP (D); Johannes Voggenhuber, MEP (A); Pekko Haavisto, verdulo, ministro pri medio (SF); Joška Fišer, MP (D); Nino Ĥkobadze (verdolino, ministro pri medio (Georgio)).

20.30 Bufedo; 22.00 Filmo "Lillies in the Bank"

Sabato 22a de junio:

9.30-10.30 Plena kunsido pri Verdaj Vizioj: Ralph Nader (kandidato de Verduloj por Usona prezidento)

10.30-13.00 Forumoj pri specialaj temoj. Tagmanĝo.

15.00-18.30 Prezento de malneto de Verdaj Vizioj por la 21a Jarcento.

Laborgrupoj pri:

Ekologia evoluo. Komuna sekureco. Nova Civitaneco. Nordo-Sudo rilatoj. Ĉiu grupo ellaboros prioritatojn por EFVP kun atingendaj celoj ĝis 1999 (2a-kongreso).

19.00 Plena kunsido. Reportado de la laborgrupoj.

20.00 Vespermanĝo. Muziko kaj dancado.

Dimanĉo 23a de junio:

9.30 Ratifiko de la IGC-dokumento de EFVP (IGC = Inter-Registara Konferenco), koncize:

" Por la Maastricht-Reviziokonferenco 1996 la Verduloj en Eŭropo proponis siajn konceptojn rilate al demokratio kaj kondiĉoj por estontaj membroj de EU kaj kunlaboro por paca, ekonomia, sociala kaj ekologia evoluo. Same virinaj kvotoj je oficaĵaj postenoj en EU.

Grava celo devus esti la ekologie daŭrigebla evoluo (angle: "sustainability"). Komuna eŭropa valuto enkondukendas, tamen sen urĝo. Homaj rajtoj kaj eŭropa civitaneco, inkluzive de duobla civitaneco por ĉiuj legalaj enloĝantoj necesas. Nemilitista politiko estos evoluenda por ke anstataŭi la NATO kaj WEU fortojn; kun la celo de paco-orientita rolo. "

Mi petas helpanton por traduki la nunan tekston, poste certe necesos aktualigo.

10.00 Prezento de la dokumento Verdaj Vizioj (Viena Deklaro) - eble ankaŭ tradukinda en E-on.

12.00 Ronda tablo de prezidantoj aŭ "parolantoj" de Verdaj Partioj: Juergen Trittin (D), Madeleine Petroviĉ (A), Dominique Voynet (F), Heidi Hautala (SF), Zurab Zhvania (Georgio), Ripa de Meana (I), Gyorgy Droppa (HU).

13.30 Ferma Parolado.

Arbaroj:

Post la ekvatoraj pluv-arbaroj kiuj jam estis tre reduktitaj nun sekvas la arbaroj de frosta klimato-zono (borealaj arbaroj) en Kanado, Alaskao, Nordeŭropo kaj Siberio. La ekspluatantaj firmaoj ŝajne sentas sin senkulpaĵaj - ĉar ja la registaroj permesas. Ambaŭ kune detruos la diversecon de plantoj kaj bestoj en tiuj vastegaj regionoj.

Same kiel en la ekvatoraj arbaroj la regajno de la natura stato daŭros pli longe ol en la moderaj zonoj - se oni finfine lasos la regionojn al si mem. Tio ne estas ĉio, ankaŭ en Tibeto la okupanta ĉina registaro lasas forhaki tutajn arbarojn; nur nun ilikomencis planti forstojn - certe malpli ekologia ol la antaŭa situacio.

Balenoj:

En Jutlandio (dana duoninsulo) mortis granda baleno; oni analizis ĝin kaj trovis ege altan procentaĵon de pezaj metaloj kiel Hidrargo kaj Kadmio en ĝi. Perversa efiko - oni devas trakti ĝin same kiel speciala rubo !

Ozon-tavolo:

Nun ankaŭ super Norda Eŭropo montriĝis pli granda redukto de la ozon-tavolo, ol oni antaŭkalkulis. Same kiel en Aŭstralio homoj riskas kanceron de la haŭto, se ni estas tro longe sub influo de la suno. Kaj ankoraŭ konstante vaporiĝas la kaŭzantoj de tiu ozon-detruo el multaj fridujoj kaj aliaj instalaĵoj. Necesas surtera kolekto kaj kemia ŝanĝo de tiuj FCKW (Fluor-klor-hidrokarbonidoj) al nedanĝeraj kombinaĵoj.

Eŭropa Unio:

- Maastricht II (financa harmonizo kaj Euro-mono), mi aŭdis, ke Francio reduktis la interezon por normala ŝpar-mono je de 4.5 al 3.5 (aŭ simile). Kaj aliaj landoj kiel Germanio premas al sociala reto, por ke superi la financon "truon" de la ŝtato (bv. vidi je "Vieno"). - BSE-epidemie: Cerbo malsaniĝo de bovoj (kaj aliaj bestoj) kaŭzata de malgranda proteino (priono) kiu detruas la cerban strukturon. - pro timo, ke tiu BSE-substanco, povus endanĝerigi la bestokulturon kaj ankaŭ la homojn de tuta Eŭropo, oni decidis buĉi kaj forbruligi je alta temperaturo milionojn da bovoj. Plejmulto de ili tutverŝajne estas sanaj. Kaŭzis tiun problemon la malnatura nutrado de bovoj per viando-farino el bovoj aŭ ne uzablaj partoj de bovoj. Oni devigis la bovojn al kanibalismo ! Estus pli inda pripensi la tutan sistemon de nutrado en nia "civilizita" Eŭropo - vi certe scias, ke ekzistas aliaj kulturoj rilate al uzado de buĉitaj bestoj, ekz-e ĉe nordmaraj popoloj. Unue oni pardonpetas al la animo de la besto, kaj due oni uzas ĉiujn partojn de la korpo. Eble iu de vi scias pli pri la laŭ-natura konduto.

Aral agado:

Bedaŭrinde mi ne ricevis novan informon de Murodkul Rozikov - almenaŭ esperas, ke li bonorde alvenis hejmen. De prof-ino Bahro mi ricevis oficialan informilon

pri la nuna situacio;

je registara nivelo oni devas pritrakti la malpligrandigo de elpreno de akvo el la riveroj Syr-Darja kaj Amu-Darja, ĉar ĉiuj kvin ŝtatoj de Centra Azio estas koncernataj. Fine de majo estos konferenco en Taŝkent de NRO'oj (NeRegistaraj Organi-zoj). Mi demandis, ĉu unu el niaj amikoj de Samarkand povos partopreni.

Brest (Belarusio) - Balta hidro-regiono:

Mi estas en kontakto kun Medio kaj Mi, loka neregistara grupo, plejparte de fakuloj el fakaltlernejo. La plej urĝaj celoj estas plibonigo de la instalaĵo por trakti komunumajn malpurigitajn akvojn (abakvo ?) kaj de la rilataj kanal-duktoj; necesas aliro al financaj rimedoj de la Eŭropa Banko por Rekonstruo. Krome temas ĝenerale pri media pedagogio.

Forumo Etnoj kaj Naturo:

Okazis 1995 en Poprad, surpiede de Altaj Tatroj. Ĉefe pri etnoj de meza Eŭropo. Momente mankas tempo kaj spaco por pliaj detaloj. Se vi inter-esiĝas, bonvolu mendi la bultenon kun tema informo aŭ la libro pri prelegoj rekte de Lev Medvedev: Akademio de Nova Pensado, Pjatickaja 7, RUS-113035 Moskvo; aŭ e-poŝte: soceco@glas.apc.org .

Tibeto kaj aliaj landoj ĉirkaŭ Ĉinio:

Daŭras subpremo de movadoj por sendependeco de tibetaj kaj uiguraj popoloj. Krome multaj ĉinoj estas allogataj de la ĉina registaro al tiuj terenoj, kiuj ĉinio traktas kiel provincoj.

En APC-reto mi legis i.a. pri terura suferado de nomadoj pro neĝa ventego kaj ke plejmulto de iliaj bestoj mortis - mi ne scias, ĉu la premo de ĉina setlado respondecas, ke la nomadoj suferis en tiu kata-strofo aŭ ĉu temas pri "normala" troigo de la klimato ?

Grundminoj:

Post la kongreso en Tampere mi ricevis plenan liston de subskriboj por halti la produktadon de grundminoj (sur- aŭ subteraj eksplodiloj). Kaj sendis al la UNHCR respondeculo pri grundminoj en Genevo. Kiel vi eble legis, ĝis nun la respondecaj registaroj ne akceptis halton. Pozitiva informo:

Aŭstalo demetas grundminojn el siaj arsenaloj kaj ili petos de UN malpermesi ilin tutglobe. De tempo al tempo eĉ eŭropaj pac-tenantoj (angle: peace-keeper) estas vundataj de grundminoj en eksa jugoslavio.

Ĉu ne estus inda preni ĉiujn fortojn por ke sendanĝerigi la metitajn minojn en la tuta mondo ? Por ke rezoni laŭ-sisteme: se iu aĉetas minojn oni almenaŭ devus tuj pagi en internacian kason la miloblan prezon por la post-milita sendanĝerigo kaj por la rehabilitado de la suferintoj ! Mi petas pardo-non, se mi aspektas cinika - kaj petas pri viaj opinioj.

- - - -

Raporto de la AVE-renkontiĝo en Prago '96

29 partoprenantoj el Ameriko kaj Eŭropo ĉeestis je la renkontiĝo de la Asocio de Verduloj Esperantistaj, kio okazis lunde posttagmeze (1996-07-22). Estis raporto de la sekretario, Manfred Westermayer, pri la agado enkadre de Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj (EFVP) kun kiu AVE havas bonan kontakton. Tamen montriĝis je interparoladoj en Vieno, okaze de la 1-a kongreso de la EFVP kie AVE havis inform-standon, ke la scio pri Esperanto ne estas sufiĉe ampleza. La AVE-anoj intencas plidaŭrigi la sistemon de salutleteroj al verdaj politikistoj en iliaj gepatraj lingvoj. La interkonatiĝo de la AVE-anoj bone montris la diversecon kaj same la unuecon de la verda movado ene de la esperantistoj.

AVE-Agadoj:

Dezertigo - Biodiverseco

Informo estis pri la daŭra katastrofo, kiun trafas la regiono ĉirkaŭ la **Aral-mar**o pro la neracia depreno de akvo el la du alfluantaj riveroj pro akvumi koton- kampojn. Murodkul Rozikov, kiu

ĉijare ne povis ĉeesti, sendis valorajn informilojn pri la nuna agadplano de UN- evoluprogramo (UNDP).

Alia kriza regiono estas la rusaj insuloj **Aleutoj**, kie laboras tri sciencistinoj por helpi al daŭrigebla evoluo. Alimaniere estus perdo de la biodiverseco, ne nur sur la insuloj sed pli grave en la ĉirkaŭanta Bering-marŝo pro tro-fiŝado kaj ĉasado.

Besto-Rajto

Agadpunkto estis la besto-rajto, kiun prezentis Anita Altherr. Ĝi ampleksas de loka iniciativo ĝis europa nivelo, ekz-e kontraŭ taŭro-batalo, ĉasado de migrantaj birdoj kaj plurtaga transporto de buĉotaj bestoj. Norina Cijan petis nin protesti kontraŭ la birdokaptado (i.a. kantigi birdojn) je la Konsilaro de la Regione Friuli Venezia Giulia, Piazza Oberdan 6, It-34100 Trieste (Italio).

Grund-minoj

La subskribojn de partoprenantoj de la 80-a UK en Tampere por mondvasta malpermeso de grund-minoj (eksploziloj kontraŭ homoj kaj bestoj) estis senditaj al koncerna adreso de UN- oficejo en Genevo. Bedaŭrinde la ŝtatestroj nur malpermesis la senmetalajn minojn. Nun necesas nova strategio. Ekz-e interparoloj de akci-posedantoj je Daimler-Benz, kiu krom aŭtomobiloj (Mercedes) ankaŭ produktas minojn kontraŭ veturiloj. AVE subtenos tiun ĉi agadon de RIB (Armad-oficejo, Germanio) kaj aliaj organizoj.

Organize

Pri tute alia afero temis rilate al la konkurenco kun la nova asocio TADEN (nefumantoj esperantistaj). Kompreneble AVE ankaŭ estas kontraŭ la poluo de la aero. Do, la AVE-anoj sentis la neceson plifortigi la **agado por plibonigo de la aero**; ekz-e pere de pli bonaj filtriloj je brunkarbaj hejtejoj (en norda Bohemio).

Memrespondeco estis plurfoje admonita; ne nur sufiĉas respondece agi mem - ankaŭ en la politikan sferon ni devas enmeti niajn proponojn.

Post vigla diskuto de tiuj temoj sekvis informoj de Lev Medvedev pri sia projekto **Etno kaj Kulturo**.

Tatjana Auderskaja el Odesso (Ukrainio) invitis 1-e por internacia (Esperanto) infan-junulara **naturprotekta tendaro** kaj 2-e pri ekologiaj ekskursoj al la natura rezervejo "Delto de la Dnestro". Ŝia adreso: ul. Korolenko 5-B, kv.26, Odessa.

e-poŝto: loz@loz.intes.odessa.ua

Estontaj renkontiĝoj:

Planita estis AVE-seminario pri verda politiko kaj sperto de naturo ('98). Bedaŭrinde la inviton de H.Marinov al Bulgario ne estis akceptita, anstataŭ tio nun ni planas je Larz'ac, apud **Montpellier**, kie estos la 83-a UK ('98). Ges-oj Sion pretis organizi la lokon.

Ĉu AVE-anoj renkontiĝos oficiale en **Adelajde (UK '97)** ankoraŭ estas necerta; ĉar neniuj de la ĉeestantaj povis diri, ke li/ŝi ĉeestos tie. Mi petas AVE-anojn, kiuj intencas veturi tien, kontakti la AVE- sekretarion pri tio.

La AVE-renkontiĝo '97 estis planata enkadre de la Eŭropa Kongreso de Esperantistoj en **Stuttgart, Germanio**, 1997-05-16/19, tago kaj horo ankoraŭ ne fiksita.

Asocio de Verduloj Esperantistaj, www.verduloj.org, ave@verduloj.org

UEA-konto (por donacoj): avex-z; Sekretario: Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, DE-79194 GUNDELFINGEN; manfred@westermayer.de